

# Eŭropa Bulteno

Aprilo 2010, N° 6 (95)

---

- [Pri la situacio de esperanto en Italujo](#)
  - [Laborgrupo pri aktiva europa civitaneco](#)
  - [Eŭropa federista movado kaj Esperanto](#)
  - [Por ke Esperanto eniru la eŭropajn organizojn](#)
  - [Kiel plifortigi la rajtojn de eŭropanoj](#)
  - [En Pollando seminario por pliaĝuloj](#)
  - [En Oostende omaĝe al vizito de Zamenhof en 1905](#)
  - [Instruista trejnado en Poznań](#)
  - [Nacia Esperanto-Kongreso en Kroatio](#)
  - [Renkontiĝo de e-verkistoj en Hrašćina \(Kroatio\)](#)
- 

*Karaj gelegantoj!*

*Ni decidis enkonduki konstantan rubrikon en la Bulteno sub la komuna nomo: **Niaj Landaj Asocioj** en kiu ni en ĉiu numero aperigos artikolon pri la situacio kaj stato de Esperanto en unu lando kaj aparte en ties landa asocio. Kaj jen la unua en la serio: **ESPERANTO EN ITALIO KAJ ITALA ESPERANTO-FEDERACIO** el la plumo de ĝia prezidanto: d-ro Renato Corsetti:*

---

## PRI LA SITUACIO DE ESPERANTO EN ITALUJO

Ĉi tiu artikoleto prezentas la situacion de la movado por Esperanto en Italujo. Ĝi celas prezenti ĝin ĉefe el la vidpunkto de la ebla subteno, kiun italaj esperantistoj povus doni al EEU, se ĝi petus ĝin.

Itala Esperanto-Federacio (IEF) estas la landa asocio de UEA en Italujo. Italaj esperantistoj havas historion de “ĉiuj en unu asocio, kaj ni kverelu inter ni interne de la sama asocio”. La ceteraj land-nivelaj asocioj estas fakaj asocioj, tiu de la instruistoj, de la katolikaj esperantistoj, de la nevidantaj esperantistoj, kaj de la fervojistoj.

La asocio konsistas el proksimume 45 lokaj grupoj, kies membroj estas aŭtomate membroj de IEF (la grupoj kaj la federacio dividas inter si la kotizojn), kaj el izolitaj membroj (normale loĝantaj en lokoj, kie ne ekzistas loka grupo).

Ĝi gvidas la agadon de la lokaj grupoj pri informado. Dum la lastaj jaroj ĝi liveras senpage informmaterialon produktitan land-nivele al ĉiuj lokaj grupoj, kiuj bezonas ĝin en la bezonata kvanto. Mem ĝi prizorgas la informadon al la parlamentanoj kaj al la gazetoj per aŭtomatigita gazetara servo. Ĝi ankaŭ informas kandidatojn al la naciaj elektoj, kaj prizorgas servon de programetoj en la nacia televido, laŭ kanalo malfermita al NeRegistara Asocioj. Ĉi tiu tuta informa laboro estas faciligata pro sistemo ekzistanta en Italujo, laŭ kiu asocioj registritaj ricevas parton de la 5 mil-onoj de la impostoj, kiujn impostopagantoj povas indiki kiel donaceblajn al difinita asocio. Kiel vi povas imagi la konkurenco inter la asocioj estas grandega.

Ĝi ankaŭ kunlabore kun la itala landa sekcio de ILEI okupiĝas pri instruado. En Italujo, kiel en ĉiuj aliaj



ekonomie evoluintaj landoj iĝas ĉiam pli malfacile aranĝi la tradiciajn kursojn, kiujn la homoj vizitas ĉiusemajne. Ĉefe por gejunuloj la reto estas la preskaŭ sola kanalo, kaj tion ni provas ekspluati. En Italujo ni havas italan kurson por junaj homoj, gvidatan de la junulara sekcio de IEF, kiu donas stud-gvidanton al ĉiu aliĝinto, kaj fidas ke la studgvidantoj laŭgrade portos la homojn al la movado (kio por procentaĵo efektive funkcias). Aldone al tio estas retaj paĝoj, oferto de aliaj materialoj en la reto, k.t.p. Kompreneble la lokaj grupoj ankaŭ foje havas siajn proprajn pagarojn en la reto. Kompreneble apud tio ekzistas la kutimaj agadoj: eldonado de revuo, aranĝado de nacia kongreso ĉiujara. La papera revuo perdadas sian kapablon gvidi la movadon per ĝustatempaj informoj, alivorte informi en la ĝusta tempo pri aferoj por fari aŭ por aĉeti. Espereble la reta bulteno, kiu nun estas sendata senpage al pluraj miloj de abonantoj (multaj retaj ekskursanoj) iam povos transpreni ĝian lokon. La nacia kongreso ankaŭ estas en periodo de ŝanĝiĝo. Ĝi akiras unuflanke la funkcion de lernejo por komencantoj kaj por progresantoj, kaj aliflanke transformiĝas al speco de kultura festivalo, kun eksterlandaj prezentantoj. Ĉar en la itala socio entuziasmoj pri Eŭropo abundas, estas relative normale uzi en la informado la ideojn pri lingva justeco en Eŭropo. Se EEU havus iniciatojn en la Parlamento en Bruselo, ni certe povus provi mobilizi niajn eŭropajn parlamentanojn. Se EEU dissendus tekstojn por disvastigi, ni certe povus traduki ilin al la itala kaj puŝi ilin al la publiko. Mi volas provi resumi per unu lasta frazo nian situacion: Ni restas stabilaj (aŭ pli precize: malrapide malsuprenirantaj) kiam temas pri kotizantaj membroj, sed la agado restas je bona nivelo kaj la emo agadi estas grandeta inter la aktivuloj. Bonŝance pro la lastatempa granda enmigrado ni ankaŭ ricevas aktivulojn el orienteŭropaj landoj, kiujn ni provas tuj integri en la asocion. Se EEU petas ion, ni pretas fari. Nia ideo estas, ke oni devus diri al EU, ke italoj komencas laci esti duarangaj civitanoj en ĉi tiu tut-usona Eŭropo, kaj ke oni devus proponi Esperanton kiel justan solvon malgraŭ tio, ke oni ne akceptus la proponon.

***Renato Corsetti,***

prezidanto de IEF

## **LABORGRUPO PRI AKTIVA EUROPA CIVITANECO**



Jam dum du jaroj EEU kunlaboras en la grupo por aktiva eŭropa civitaneco. Temas pri la grupo de neregistaraj organizoj kiuj iam ricevis ĝeneralan jaran subvencion de eŭropa programo „Eŭropo por civitanoj“, kiun EEU havis en 2008. La grupon regule 3-4 foje jare kunvokas Eŭropa Komisiono kadre de la tiel nomata strukturigita dialogo de la Komisiono. La Komisiono uzas du bazajn kunlaborrimedojn: „malferma metodo de kunlaborado“ kun la membroŝtatoj kaj „strukturigita dialogo“ kun civitanoj pere de neregistaraj civitanaj organizoj.

La 21-an kaj la 22-an de junio 2010 mi partoprenis nome de EEU dutagan aranĝon de la programo „Eŭropo por civitanoj“, unuan organizitan de la komisiona ĝeneraldirekcio pri komunikado, nova administranto de la programo, kiu transprenis ĝin ĉi printempe de la ĝeneraldirekcio pri edukado kaj kulturo.

La unuan tagon estis organizita la dua ĉi-jara kunsido de la grupo por aktiva eŭropa civitaneco. Prezentiĝis novaj kunlaborantoj de la programo flanke de la Komisiono kiuj ankaŭ prezentis la ĉi-jarajn faktojn pri la programo kaj ĝiaj alvokoj kaj la preparojn por de EU proklamita jaro de volontulado 2011. La temoj de la unuopaj jaroj ĉiujare eniras la temarliston por subvenciotaj projektoj kaj organizoj. Ĉi foje la temon

„volontulado“ iniciatis la grupo mem kaj parte forte lobiadis por ĝi en la Eŭropa parlamento kaj ĉe la Komisiono. Pro tio la Komisiono regule informas nin pri aktualaj preparoj kaj planoj. Krome membroj de la grupo prezentis rezultojn de la laboro de la laborgrupo pri financoj en kiu mi mem kunlaboris. Niajn proponojn pri financaj reguloj aplikatajn por ĉiuj subvencioj flanke de EU la komisiono konsultis dum la preparoj de la propono pri ŝanĝoj de la financa regularo de EU kiu momente troviĝas en la procezo de aprobo de la Parlamento kaj la Konsilio.

Vespere estis organizita komuna vespermanĝo dum kiu mi uzis la okazon diskuti kun pluraj reprezentantoj de aliaj ĉefe eŭroponivelaj organizoj.

La 22-an de junio okazis granda komuna aranĝo por kolekti novajn ideoj pri la strukturo kaj temoj por la nova generacio de la programo „Eŭropo por civitanoj“ kiu komenciĝos en 2014, post la aktuala programo 2007-2013. Temis pri de profesia firmao gvidita aranĝo kun diversaj tipoj de diskutoj kaj ludoj en kiuj samnivele partoprenis reprezentantoj de neregistaraj organizoj, de eŭropaj komunumoj partoprenantaj en la programo, de naciaj komitatmembroj de la programo kaj de la Komisiono mem. Ariĝis multaj proponoj kaj ideoj el kiuj ĝis la tagmanĝo oni decidis pri la 10 plej subtenitaj. Pri ili posttagmeze okupiĝis unuopaj laborgrupoj kiuj ellaboris konkretajn proponojn por ĉiu temo. Post la fina resumo ni ĉiuj devis respondi al la demando kion ni lernis. Laŭ mi la plej trafa respondo estis tiu de la reprezentanto de Euclid-reto “Mi eltrovis ke ĉi tie estas multaj homoj kiuj okupiĝas pri aferoj kiuj tute ne interesas min, sed tio estas bonega. Ĝi montras ke estas multaj temoj kiuj gravas por eŭropaj civitanoj kaj ke estas homoj kiuj engaĝiĝas pri ili.“ Estis interesa unua paŝo sur la longa vojo akceptigi ŝanĝojn por la nova generacio de la programo kiu laŭ mi estas unu el la plej bone organizitaj eŭropaj subvenciprogramoj konstante dialoganta kun la uzantoj.

*Maja Tišljar*

## **EŬROPA FEDERISTA MOVADO KAJ ESPERANTO**

### **POR KE ESPERANTO ENIRU LA EŬROPAJN ORGANIZOJN**



Startante el la konstato ke la Eŭropa Federisma Movado kaj la EU-institucioj fakte miskonas la oportunun de Esperanto, ni partoprenu la Federisman Movadon por diskonigi la utilecon de nia lingvo.

#### **UEF (Unio de Eŭropaj Federistoj)**

Kiel konate en la tuta Eŭropunio agadas la prestiĝa movado UFE, kiu aranĝiĝas laŭ landaj sekcioj. La esperantistoj, kiuj konscias pri la graveco de la federisma vojo por la estonto de EU, estas varme invitatataj persone aliĝi al la landaj sekcioj. La telefonoj kaj adresoj de la landaj UEF-organizoj estas atingeblaj ĉe la retejo <<http://en.federaleurope.org/index.php?id=3365>> aŭ inter la aldonitaj dosieroj de la retgrupo [EU-federo], pri kiu oni parolas tuj poste. La dosiero titoliĝas "Landaj UEF-organizoj". Rilate al la tre interesa retejo de UEF <<http://en.federaleurope.org>> mi atentigas ke ĝi estas nur trilingva (angla, franca kaj

germana), kvankam Eŭropunio havas 23 oficialajn lingvon... evidente UEF jam en sia agado devas alfronti la malfacilaĵon pri la lingva problemo. Tial la esperantistoj, kiuj partoprenas la Eŭropan Federistan Movadon, povus agadi por la esperantigo de tiu TTTejo kaj por la traduko al ĉiuj 23 lingvoj, tra esperanto. Tiamaniere ni montrus al UEF la gravecon kaj la utilecon de Esperanto por la disvastigo de la Federista Movado.

### **La Google-grupo [EU-federo]**

Eble multaj esperantistoj ne konas ke de kelkaj monatoj ekfunkcias nova diskutgrupo, en lingvo Esperanto, kies celoj estas:

- informi pri la vivo de Eŭropunio;
- favori al federa EU, agorde kun UEF;
- gastigi liberan debaton, senpartian kaj sendependan laŭ la preskriboj de UEF.

En la ĉefpaĝo estas indikoj por aŭskulti la Himnon de Eŭropo (muziko de Beethoven, teksto de U. Broccatelli).

Inter la aldoniĝoj de la ĉefpaĝo troviĝas krome jenaj esperantaj tekstoj:

- la listo de la membro-ŝtatoj de Eŭropunio kaj de la ceteraj ŝtatoj de Eŭropo,
- dokumento pri "*Eŭropa federismo*" redaktita de J-K Rinaldo kaj reviziita de U. Broccatelli,
- la Manifesto de Ventotene, tradukita de U. Broccatelli,
- "*Landaj UEF-organizo*", la citita listo de la landaj UEF-organizoj,
- laŭtema EU-terminareto, skizita de J-K Rinaldo kvankam plibonigenda,
- TEU (Traktato pri EU),
- ĈFR (Ĉarto pri la Fundamentaj Rajtoj),

Por viziti la grupon: <http://groups.google.com/group/EU-federo>

Por aliĝi al la grupo: [EU-federo+subscribe@googlegroups.com](mailto:EU-federo+subscribe@googlegroups.com)

### **Traduko de la ĉefaj oficialaj traktatoj de Eŭropunio**

Indas memori ke la ĉefaj EU-traktatoj estas:

- ĈFR=Ĉarto de la Fundamentaj Rajtoj
- TEU=Traktato pri EU (la baza traktato)
- TFEU=Traktato pri la Funkciado de EU (la aplika traktato).

Tiuj tri traktatoj estas legeblaj nacilingve ĉe <http://www.consilium.europa.eu/showPage.aspx?id=1296&lang=en>

Tamen jam nun la unuaj du cititaj traktatoj estas esperantigitaj kaj legeblaj inter la aldonitaj dosieroj de la grupo [EU-federo]. Kvankam ilia esperantigo ne estas ankoraŭ finreviziita, ankaŭ pro la fakto ke ofte la nacilingvaj tradukoj ne tute kongruas inter ili, eble en tiuj okazoj venkas la anglalingva traduko.

Fakte la esperantigo de la du traktatoj fontas el la SAT-tradukoj (okaze de la fiaskinta EU-konstitucio), kun postaj adaptigoj, ĉefe pro la Lisbona Traktato.

***J-K Rinaldo el Padova.IT.EU***

---

## KIEL PLIFORTIGI LA RAJTOJN DE EŬROPANOJ

La Eŭropa Komisiono lanĉis iniciaton por kolekti opiniojn de civitanoj rilate al "kiel plifortigi la rajtojn de eŭropanoj". La retejo estis nur en la angla.

[http://ec.europa.eu/justice\\_home/news/consulting\\_public/news\\_consulting\\_public\\_en.htm](http://ec.europa.eu/justice_home/news/consulting_public/news_consulting_public_en.htm)

Ĉar oni malkovris la inviton tre malfrue, ne eblis oficiala reago de la estraro de EEU. Feliĉe baze de alvoko de nia estrarano Peter Balaž reagis du esperantistoj.

Leo De Cooman el Belgio skribis nederlandlingve al la Komisiono la jenon:

*ke ĉefa EU-civitana rajto estas ricevi informojn de EU en sia propra lingvo*  
*- kaj same estas ĉefa rajto mem esprimiĝi al EU en sia propra lingvo*  
*- ke mi konstatas, ke EU evidente ne respektas tiujn rajtojn, ĉar mi malofte trovas informojn en mia gepatra lingvo, ankaŭ ne la nunan inviton esprimiĝi pri plibonigo de civitanaj rajtoj*  
*- ke ni jam oftege klarigis, kiel ĉiuj civitanoj egalrajte povus interkompreniĝi*  
*- ke la respondeculoj de EU simple ignoras tiujn atestaĵojn niajn.*

Kaj David R. Curtis jene:

*Kiel civitano de Eŭropa Unio, mi opinias ke la vojo al fortigo de rajtoj de EU-civitanoj estas starigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj de membro-ŝtatoj. Tio fine ebligos al EU havi neŭtralan komunan lingvon, kaj tio, siavice, donos al ĉiuj civitanoj egalajn lingvo-raĵtojn. Nuntempe britoj, inkluzive de mi, havas maljustan avantaĝon. Ili ne devas lerni duan lingvon, sed homoj de ĉiuj aliaj EU-landoj devas klopodegi multekoste por lerni lingvon kiun homoj, kiel mi, estas uzintaj ĉiun tagon, dum la tuta vivo. Ŝanĝi tion ne okazos tranokte, sed se ĉiu membro-ŝtato klopodus konforme dum la vivo de la venonta generacio, la necesa ŝanĝo fine okazus, kaj EU-civitanoj kapablus finfine interkomuniki sur bazo de lingvo-egaleco.*

**Zlatko Tišljar**



Viviane Reding, vicprezidantino de Eŭropa Komisiono, respondeca pri justico, bazaj

rajtoj kaj civitaneco

## PRI WikiTrans DENOVE



Koran dankon por la plusendado de la informo pri Vikipedio.

Tamen, endas diri ke kelkaj asertoj en la artikolo de Zlatko Tišljar estas personaj opinioj de la verkinto, dum kelkaj aliaj estas eĉ tutsimplaj malveraĵoj.

Mi klopodu klarigi la aferon.

*»La specifa celo estas traduki aŭtomate la tutan anglalingvan vikipedion al Esperanto kaj ĝi jam tion faras. Ĝis nun estis tradukitaj 800.000 artikoloj. Kontrolu mem, la tradukoj havas tian altan traduk kvaliton, ke apenaŭ eblas trovi frazon kun tiaj eraroj, kiuj malebligus la komprenon. Vidu ĉe: <http://epo.wikitrans.net/> »*

La laboro de sinjoro Bick plene priĝratulindas, sed ja malveras, ke miskomprenoj apenaŭ eblas. Juĝu mem la jenan ekzemplon el la artikolo pri kosmo-esploriloj senditaj al Marso:

Artikoltitolo: "*Marso prienketas programon*".

Enkonduko: "*La Marso programas estis serio de Marso kastris deorbitulojn kaj enorbituloj lanĉis aŭ provis lanĉi proksime de Sovet-Unio kiel parto de la sovetia spacprogramo en la 1960s-1960s-1970s.*"

Ĉu sufiĉe?

Krome, ne sufiĉas ke teksto ebligu komprenon, por ke ĝi estu nomebla Esperanto. Ŝajne iuj plu konfuziĝas inter Esperanto kaj Eŭropanto. Mi neniam trafolumus enciklopedion, kiu "*ne malebligas la komprenon*". Mi deziras legi kiel eble plej precizajn kaj bonlingvajn tekstojn, je tiu sama kvalito, kiun vikipediistoj ĉiutage klopodas akiri per sia ada laboro.

Ĉu la nekompreneblaĵo kiun mi menciis ĉi-supre iĝu plenrajta parto de la Vikipedio, samrange kiel artikolojn kiujn centoj da laboremaj esperantistoj verkadas dum sia libertempo, kelkfoje atente elektante eĉ ĉiun unuopan vorton?

*»Kondiĉe, ke la homoj kiuj ĉefe gvidas kaj administras la E-an vikipedion konsentu, ke la rezulto de WikiTrans eniru la E-an vikipedion. Imagu la prestiĝon kiun ni gajnus! Mi klopodis iniciati diskuton pri tio kun vikipediistoj kiuj administras la E-an vikipedion, sed neniu reagis.«*

Malfacilas helpadi Vikipedion, se oni eĉ ne klopodas malfermi ĝin antaŭ ol komenti pri ĝia enhavo. Fakte, dum mi skribas, la \*UNUA\* diskutero en la Diskutejo estas ĝuste pri WikiTrans, kaj pluraj vikipediistoj amplekse kundebatis tie per siaj opinioj kaj komentoj.

Tamen en la artikolo oni asertas, ke "*neniu reagis*". Tre facile kontroleblas, ke tio estas malvero. Ne disvastigu malveraĵojn.

En la diskutejo, interalie, mi detale klarigis kial amasa enmeto de malbonlingvaj maŝintradukaĵoj draste \*mal\*levus la prestiĝon de la Vikipedio en Esperanto kaj ridindigus la sintenon de nia movado – kiu ŝajne esperas igi Esperanton mondlingvo sidante ĉe brakseĝo.

Mi ne deziras esti malĝentila al la verkinto de la artikolo, sed vere bedaŭrindas, ke oni diskutigas aliulojn kaj poste ne interesiĝas pri la sekvo de la afero.

*»Ĉu scienca fako de UEA kaj la Akademio ne devus iom ekinteresiĝi pri la afero?«*

Se UEA klopodos ekinteresiĝi pri maŝintradukado al Esperanto, tio certe estos por ĝi ege interesa agadkampo. Sed tio neniel rilatas al rekta aplikeblo de maŝintradukaĵoj en Vikipedio. Pri tio, decidus la vikipediistaro.

Vidu, Vikipedio estas komunumo konsistanta el ĉiuj kunlaborantoj, kiuj donas horojn da libertempo por volontule disponigi informojn kaj sciojn al la tuta homaro. La komunumo mem decidas kion fari en Vikipedio. UEA kaj la Akademio havas (kaj sukcese plenumas) tute aliajn celojn.

Amikoj, ne ekzistas trukoj por antaŭenpuŝi Esperanton sen penado. Kiu deziras, ke nia Vikipedio sukcesu, mem ekverku. Laŭ sia plaĉo, oni jam nun rajtas profiti la valoran helpon de la tradukilo de sinjoro Bick, kiu jam uzatas kiel utiliga helpilo kaj tempoŝparilo fare de vikipediistoj. Ja korekti kaj alivortigi mistradukitan tekston estas pli facile ol rekte traduki el alilingvaĵo! Pri tio, ni tute konsentas, kaj tio sufiĉas por ke ni ĉiuj alkriu grandan "*Dankon!*" al sinjoro Bick.

Sed krei prestiĝan enciklopedion per maŝintradukaĵo - tio ne eblas.

*Fabio Bettani*

## EN POLLANDO SEMINARIO POR PLIAĜULOJ

En la kadro de la Partnera Projekto „Lernado dum la tuta vivo” de GRUNDTVIG-programo 2009-2011 (subtenata de la Europa Unio kaj organizita de PEA, E@I kaj ICH kun la partopreno de [www.edukado.net](http://www.edukado.net) kaj ILEI), Katalin Kováts, redaktoro de [edukado.net](http://www.edukado.net), gvidis tutsemajnan intensan programon inter la 22a kaj 29a de majo 2010 por entute 28 polaj kaj slovakaj partoprenantoj de la projekto. La programo okazis en sudpollanda Rytro, apuda vilaĝo de Nowy Sącz, el kiu urbo devenis la triono de la grupo.

La motoro de la projekto, Halina Komar (prezidanto de Pola Esperanto-Asocio) lanĉis la seminarion kun la speciala celo lingve perfektigi la kursanojn kaj pretigi ilin al la KER-ekzamena sesio, okazigota dum SES en Slovakio, kiun la grupo partoprenos kiel trian aranĝon de la projekto.

Fine de la semajno 23 personoj jam surloke aliĝis al la somera KER-ekzamensio.



Valoras legi la detalan raporton kun fotoj fine de la reteja anonco: <http://www.edukado.net/anoncoj/23352>

*Katalin Kovats*

## EN OOSTENDE OMAĜE AL VIZITO DE ZAMENHOF EN 1905

La ostenda Esperanto-grupo "*La KONKO*" partoprenis la urbajn festojn en la "*Belle Epoque*"-kvartalo de Oostende (apud Biblioteko Kris Lambert, Wellingtonstraat).

Estis aparta grandioza evento, kie multaj asocioj, artistoj, muzikistoj, merkataj, butikistoj, ktp. allogis la turistojn (kaj la ostendanojn). Malnovaj aŭtomobiloj veturis en la stratoj de tiu "1900"-a kvartalo, kie pluraj belaj domoj estis antaŭ nelonge renovigitaj. Ankaŭ la loĝantoj de tiuj stratoj estis bele vestitaj laŭepoke.

Jen nia "rakonto":

*En 1905 okazis la unua Esperanto-Kongreso en Boulogne-s/mer (Francio).*

*En tiu periodo Zamenhof devis organizi kelkajn erojn de la kongreso en Boulogne. Sed bedaŭrinde pro lingvaj problemoj (li estas polo!) li ne atingis Boulogne sed Oostende. Feliĉe la ostendaj*

*esperantoparolantoj avertitaj per telegramo, tuj alparolis la urbestron de Oostende Alfons Pieters. Kaj do, per kaleŝo Alfons Pieters kun sia edzino, kaj Ludoviko Zamenhof kun Clara Zilbernik, alvenis en la "Belle-Epoque"-kvartalo kie ili renkontis James Ensor, faman ostendan pentriston.*

*Tiun tagon estis ankaŭ renkontiĝo kun la Reĝo Leopoldo la II-a. La reĝo estis tre interesita pri tiu ĉi nova komunikilo, la INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.*

Turistoj el la najbaraj landoj venis multnombraj al Oostende "*Urbo ĉe la maro*", tiun dimanĉon la 23-an de majo 2010.

Estis belega vetero, abundis la suno. La "konkanoj" ricevis aplaŭdojn kaj salutojn; ĉiuj volis foti la grupon. Poste ni rimarkis ke nur tiuj fotoj aperis kaj en la nacia kaj en la loka gazetoj (kelkaj partoprenintoj ĵaluzis pri tio!).



Sur la foto:

Augusta Bogaerts (amorantino de James Ensor), James Ensor, iu gvidanto (Walter van den Kieboom), Jean Vandecasteele (nuna urbestro de Oostende), esperanlistino Flory Witdoeckt, la tiama (1905) urbestro de Oostende Alfons Pieters (Marc Cuffez), lia edzino Caroline Addams (Liliane Mensaert), geesperanlistoj Bjorn Koten kaj Katia Mensaert, Ludoviko Zamenhof (Daniel Mensaert) kaj lia edzino Clara Zilbernik (Cecile Deprez).

*Flory Witdoeckt*

---



## INSTRUISTA TREJNADO EN POZNAŬ

Ankaŭ ĉi-jare startos unujara instruista trejnado en la Universitato Adam Mickiewicz kunlabore kun ILEI kaj [Edukado.net](http://Edukado.net):

[http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/uUAM/uilei\\_kurso.html](http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/uUAM/uilei_kurso.html)

Pri stipendio vidu:

[http://ilei.info/novajxoj/UAM\\_stipendioj\\_por\\_2010.pdf](http://ilei.info/novajxoj/UAM_stipendioj_por_2010.pdf)

P.S. Wizzair havas malmultekostajn rektajn flugojn al Poznań el pluraj grandaj urboj (Parizo, Romo, Londono, Stokholmo, Oslo, Dortmund, Sheffield, Burgas) kaj el multaj aliaj al Varsovio, de kie dum 3-hora trajnvojaĝo atingeblas Poznań.

Dr hab. Ilona Koutny, akademiano

Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj

Universitato Adam Mickiewicz

al. Niepodległości 4, PL-61-874 Poznań [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl)

T: +48 61-829-36-75

hejme: +48 61-872-83-09

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>



## NACIA ESPERANTO-KONGRESO EN KROATIO



La 11-an de septembro okazos en Velika Gorica (apud Zagrebo) Kroata Esperanto Kongreso. Post trijara paŭzo renkontiĝos kaj pridiskutos E-planojn esperantistoj el Kroatio. Kompreneble estas kore invitataj ankaŭ eksterlandanoj. La kongreson kunorganizas Kroata E-Ligo kaj Esperanto Societo de Velika Gorica. Ĉeftemo estos Eŭropo kaj Esperanto. La ĉefreferaĵon havos Zlatko Tišljar, sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio. Parto de la programo estos dediĉita al 60-jariĝo de Eŭropa Unio.

La kongreso komenciĝos je la 9,30 kaj daŭros ĝis la 20-a vespere. Por interesitoj kiuj deziras ekkoni la urbon Velika

Gorica kaj la ĉirkaŭajn interesaĵojn historiajn kaj kulturajn povos tranokti kaj ekskursi la postan tagon.

Aliĝkoto estas 100 kunaoj (15 eŭroj) por tiuj kiuj aliĝas ĝis la fino de junio. Poste 150 kunaoj. La aliĝilon sendu al Kroata E-Ligo, Mislavova 11, 10000 Zagreb.

Esperanto-kongreso neniam okazis en tiu ĉi urbeto kaj tial ni esperas pri via partopreno.

*Stjepan Žarina*

## RENKONTIĜO DE E-VERKISTOJ EN HRAŜĈINA (KROATIO)

La 19-an de junio okazis en eta vilaĝo en norda Kroatio Hraŝĉina en kiu Spomenka Ŝtimec havas sian domon tradicia renkontiĝo de E-verkistoj organizita de Kroatia E-Ligo. Ĉefaj gastoj estis Anna Lowenstein el Italio kaj Imre Szabo el Hungario. La literaturan kreado de Anna prezentis Zdravko Seleš kaj de Imre Kruno Puŝkar. El la verkoj de ambaŭ verkistoj legis fragmentojn Saša Pilipović, aktoro el Serbio. Post la paŭzo kun abundaj kukoj kaj kafo amuzis nin Saša Pilipović per prezento de fragmento el teatraĵo "10 tagoj de Postnikov" kaj kantado kun gitarakompano. Li disponigis al ni ankaŭ novan DVD sur kiu estas filmita la tuta teatraĵo "Dek tagoj de Postnikov" de Ŝelter-teatro el Kragujevac. La filmaĵo estas altprofesia produkto daŭranta iom malpli ol unu horon kaj mi taksas ĝin la plej altkvalita filmo en Esperanto ĝis nun ne nur pro profesia reĝisorado kaj scenografio sed ĉefe pro bonega profesia aktorado. Nepe aĉetinda disko por ĉiu esperantisto. Fine prezentis Zdravka Metz sian novan libron.

La renkontiĝo ebligis al ŝatantoj de E-literaturo refoje pliproksimiĝi al la verkistoj mem, ekscii de ili pri ilia vivo kaj maniero verki kaj ekkoni unuflanke prozon de Anna admirindan en ŝiaj du dikegaj romanoj kaj la nesufiĉe konatan sed valoran poezion de Imre.

Ĝi estis ankaŭ okazo por babiloj kaj personaj renkontoj de esperantistoj el ĉi-foje eĉ sep landoj.



Saša Pilipović kaj Anna Loewenstein



Imre Szabo kaj Kruno Puŝkar

## Eŭropa Bulteno. 2010. N° 6 (95)

### Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita:** 2010-06-02.

**Redaktoro:** Zlatko Tišljar

**Kunlaborantoj:** Fabio Bettani, Flory Witdoeckt, J-K Rinaldo el Padova, Maja Tišljar, Renato Corsetti, Stjepan Žarina

**Teknika redaktoro:** Raymond Gerard

**Leterojn kaj komentojn sendu al EEU:**

**Rete:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

<http://www.gazetejo.org>

## Ligiloj

- [http://ec.europa.eu/justice\\_home/news/consulting\\_public/news\\_consulting\\_public\\_en.htm](http://ec.europa.eu/justice_home/news/consulting_public/news_consulting_public_en.htm) The European Commission consults the public on policy papers
- <http://edukado.net/> Bonvenon ĉe la paĝaro de edukado.net!
- <http://en.federaleurope.org> Union of European Federalists
- <http://en.federaleurope.org/index.php?id=3365> UEF Member Organisations
- <http://epo.wikitrans.net/> GT WikiTrans - Esperanto
- <http://groups.google.com/group/EU-federo> Bonvenon en la diskutliston "Eŭropaj Federistoj".
- [http://ilei.info/novajxoj/UAM\\_stipendioj\\_por\\_2010.pdf](http://ilei.info/novajxoj/UAM_stipendioj_por_2010.pdf) Stipendioj anoncitaj por instruista trejnado!
- <http://www.consilium.europa.eu/showPage.aspx?id=1296&lang=en> Treaty of Lisbon
- <http://www.edukado.net/anoncoj/23352> Edukado.net anoncoj
- <http://www.gazetejo.org/> Gazetejo.org
- <http://www.staff.amu.edu.pl/%7Einterl/index.html> INSTRUISTA TREJNADO en la kunlaboro de la Interlingvistikaj
- [http://www.staff.amu.edu.pl/%7Einterl/uUAM/uilei\\_kurso.html](http://www.staff.amu.edu.pl/%7Einterl/uUAM/uilei_kurso.html) INSTRUISTA TREJNADO en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI

Notu ke en PDF dokumento, kelkaj ligiloj ne funkcias kiel atendite.

Vi devos mem kopii kaj glui la ligilon en vian krosilon,

En HTML-dokumentoj, ĉio funkcias bone.